septembro 1967

NEDERLANDA ESPERANTISTO

„La Estonto Estas Nia" - 32-a jara n-ro 9
Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

LA PROGRAMO „PASPORTO"

KIO ESTAS „PASPORTO"?

„PASPORTO" estas internacia interŝanĝo de personoj (individuoj kaj familioj) ene de la Esperanto-movado, kiu enhavas ĉiujn kondiĉojn por la sukceso de tia programo. La Programo „PASPORTO" celas nur certigi al la gasto, unuflanke, restadon kiu kompreneble realiĝos en eksterordinaraj cirkonstancoj (ne simple kiel turisto) kaj, aliflanke, liveros al la gastiganto precizajn sciigojn pri la persono gastigota. Ni petas vin pluen legi pri tio (sekvos slipo por gasto kaj gastiganto).
Ĉiuj landaj sekcioj de TEJO, kunlabore kun la landaj asocioj pere de siaj aktivuloj, varbos gastigantojn por la Programo „PASPORTO". Ĉiuj sciigoj devos esti sendataj al la Centra Oficejo de la PP: Bv. Orono 866 „A", ROSARIO, Argentino.
Por firmigi ĉi tiun programon necesas ke dum la unuaj 6 monatoj oni nur faru registron de gastigantoj. La gastiganto senpage gastigos dum libere elektota tempo (semajno, monato, jaro). Eblas organizi grupojn de gastigantoj; tiamaniere ĉiuj povas gastigi malpli da tempo. Tio faciligos la vojaĝon al la ĉiedevenaj geesperantistoj kaj fortikigos la amikecligojn inter ĉiuj individuoj kaj popoloj. La gasto nur sendos al la Centra Oficejo, krom la postulataj informoj, vidu slipon, la sumon de 2 (du) usonaj dolaroj aŭ egalvaloron por administraj kaj informaj elspezoj je la nomo de la kasisto: H. H. L. Vottero.
La Centra Oficejo de Programo Pasporto estos la peranto inter la gastiganto (individuo aŭ familio) varbata en ĉiuj landoj, kaj la tutmondaj gastoj (individuoj aŭ familioj) *kiuj bone konas la Internacian Lingvon Esperanto.* La personoj ankaŭ povas interŝanĝi gastigon.
Neniu gastiganto, reprezentanto, nek la Centra Oficejo de „PASPORTO" respondecos pri kiu ajn akcidento, ŝtelo, morto de la gasto, nek pri poŝtaj elspezoj, gladado, vestlavo kaj aliaj individuaj bezonoj.
Per „PASPORTO" oni lernos pri kunvivado. La vizitanto(j) klopodos alĝustiĝi, kaj la gastigantoj helpos por tiu alĝustiĝo. Ni certas ke interkompreno kaj amikeco en la individua nivelo estas la fundamento por daŭra tutmonda paco kaj ĉiama tuthomara feliĉo.
La organizo de „PASPORTO" restas fleksebla por ke per faka scienca helpo la pasintaj spertoj estu utiligataj de la T E J O - Komisiono por „PASPORTO", por plibonigoj en la estonteco.
En Nederlando kolektas la adresojn de la gastigantoj Nederlanda Esperanta Junularo. Se vi pretas gastigi vi sendu la jenajn informojn tajpitajn sur granda papero en tri ekzempleroj al NEJ, Makassarstr. 112-III, Amsterdam-6.

ASOCIAJ INFORMOJ

Libroj al Brazilo.

En „N.E." de aprilo 1967, p. 34 ni sciigis, ke la ĉefestraro ne ricevis iun reagon al libroj donace senditaj al la Direktoro de la Esperanto-Kurso de la Universitato Federacia de Ceará (Brazilo).
La redaktoro nun ricevis iom malfruiĝintan dankesprimon flanke de la direktoro, prof. Paulo Amorim Cardoso: „Ĉiam, kiam ni ricevas ion, ni kutimas danki. Bedaŭrinde, aŭ ni ne sendis nian karton al vi, aŭ ĝi perdiĝis dum la vojaĝo. Ni petas vian pardonon. La librojn ni ricevis je la 16-a de decembro kaj la nomon de Nederlanda Esperanto-Asocio ni enskribis en la Ora Libro sub la numero 101".

SLIPO POR GASTIGANTO (modelo reproduktenda de la interesitulo): Nomo-Adreso-Telefonnumero kaj konvenaj horoj por telefoni (hejma aŭ labora)-Konsisto de la familio: nombro de membroj, aĝoj kaj seksoj-Preferata aĝo de la gasto-Preferata sekso de la gasto-Maksimuma nombro de gastoj-Tempo de gastigado (maksimume)-Eblas organizi grupojn de gastigantoj - Manieroj por alveni al mia domo (lokaj aŭ interurbaj omnibusoj, trajnoj ktp) - Nomoj de amikoj kiuj preskaŭ certe povus gastigi por „PASPORTO" - Personaj aŭ familiaj interesoj, vojaĝoj faritaj (indiki nur landojn) - Organizoj, Asocioj, Kluboj, Eklezio, Partio kaj similaj al kiuj mi apartenas.
Se la gastiganto pretas akcepti personojn de kiu ajn deveno, ideo aŭ religio, li rajtas ne respondi pri tio. Mi estas preta interŝanĝi vizitojn kun eksterlanda familio de . . . membroj jes/ne.
Mi sciigos kiel eble plej frue pri ebla decido forlasi la programon „PASPORTO" kiel gastiganto sen ajna klarigo pri kialoj (2 monatojn antaŭtempe). La gastigantoj devus klarigi en la aliĝilo la epokon por ili plej konvenan, male, oni rajtos konjekti ke la propono taŭgas por ĉiu epoko de la jaro. Neniu gastiganto reprezentanto, nek la Centra Oficejo de „PASPORTO" respondecos pro kiu ajn akcidento, ŝtelo, morto de la gasto same kiel pro poŝtaj elspezoj, gladado, vestlavo kaj aliaj individuaj bezonoj liaj (ŝiaj-iliaj).
La servoj por la gasto komenciĝos nur en novembro 1967 ĉar la C.O. volas unue kolekti la adresojn de gastigantoj.
La unuaj registritaj gastigantoj estas en Argentino, Pollando, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Usono kaj Hungarujo.

kaj ceteraj INFORMOJ:

Ankoraŭ S-ekzameno en decembro 1967.

Laŭ „Staatsblad" n-ro 307, 1964, posedantoj de B-diplomo (instrua kapablo) aŭ S-diplomo (supera kapablo), transdonitaj antaŭ 1 jan. 1968, havas la rajton instrui Esperanton en la elementa lernejo. Tial la Ĝenerala Nederlanda Esperanto-Ekzamenkomitato decidis en decembro venonta ankoraŭ foje okazigi ekzamenon por la S-diplomo, se anoncos sin sufiĉe da kandidatoj.
Oni povos anonci sin antaŭ 1 oktobro 1967 ĉe la sekretario-kasisto s-ro G. Ellerman, De Clercqstraat 42, Amsterdam.

Semajnfino en Amersfoort.

Laŭ „Laborista Esperantisto" de junio pasinta la Faulhaber-Fondaĵo organizos semajnfinon je la 4-a kaj la 5-a de novembro en la junulargastejo „De Grasheuvel" en Amersfoort.
Provizora programo:
Sino Burgler parolos pri Julio Baghy; s-ro Michaud el Parizo pri „Rasismo konscia aŭ nekonscia".
Ankaŭ L.E.E.N.-anoj estas invitataj. Partoprenontoj povas anonci sin ĉe la sekretariino de la Fondaĵo: J. J. Schouten, Neptunusstraat 39, Haarlem.

Esperanto-Fakoj en blindulbibliotekoj.

En „Nederlanda Esperantisto" de junio ni informis pri granda fako de Esperanto-verkoj en la „Le Sage ten Broek"-biblioteko en Nijmegen (Panovenlaan 1).
Laŭ iniciato de s-ro J. Th. Punt el Utrecht, sekretario de F.E.N., nun ankaŭ la blindulbiblioteko en Amsterdam komencos starigi Esperanto-sonbendan fakon. Jam anoncis sin seso da voĉlegantoj.

„Algemeen Handelsblad" pri Esperanto.

En „A.H." de 18 junio 1967 Rudy Kousbroek verkis artikolon pri E. sub la titolo „Esperanto estas por kinkeloj" (sic!).
Sekve li ricevis multe da leteroj, responde al kiuj li verkis duan artikolon en la sama ĵurnalo de 8 julio: „Desesperanto".
Laŭ Kousbroek Esperanto estas simptomo de utopia kredemo de 19-jarcentaj idealistoj. Laŭ li ne gravas *fari* universalan gramatikon, sed eventuale konstati ĉu ĝi estiĝas. Estas fakte pli grave *trovi* ĝin.
Kousbroek estas poeto kiu kunlaboris en la movado de la t.n. „eksperimentuloj" kaj verkis anglalingvan romanon „The Enemy".
Oni povas meti multajn demandajn signojn en lia argumentado, ekz. kiam li pledas por enkonduko de la ĉina ideografia skribado kiel internacia interkomunikado!

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!
Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

La likvidigo de la Esperanto-movado en Nederlando dum la milito.

Kiel oni povis legi en multaj jurnaloj de la 15-a de julio pasinta, la nederlanda registaro sendis al la registaro de la Germana Federacia Respubliko liston kun la nomoj de 658 personoj suspektitaj pro militkrimoj. Antaŭ du jaroj la Okcidentgermana registaro petis sendi al si tian liston.
Inter la menciitaj nomoj troviĝas ankaŭ tiu de d-ro Schwier, la iama likvidinto de la Esperanto-movado en Nederlando (marto-aprilo 1941). D-ro Schwier estis estro de la fifama koncentrejo „Erica" en la apudeco de Ommen.
Pri la agado de Schwier kontraŭ Esperanto oni povas legi en „La Praktiko", 1946, p. 15-16.

La „Catharina-Fondaĵo".

Antaŭ tri jaroj la edzino de unu el la membroj de KUNE (Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj) grave malsaniĝis. Feliĉe ŝi bone resaniĝis. Por esprimi sian dankemon tiu membro, kiu volas resti anonima, donacis certan sumon al KUNE kaj la estraro kompilis regularon. Unu el la reguloj estas: ĉiu infano, kiu sukcesos en la E-ekzameno kaj kies patro estas membro de KUNE, ricevos oran moneron po dek guldenoj.
La fondaĵo ricevis sian nomon laŭ la antaŭnomo de la donacintino. Tiun ĉi jaron Donita Koopmans el Leiden ricevis la moneron.
La ideo donaci moneron por tia celo ne estas nova. Jam antaŭ proksimume 40 jaroj estis en Hago iu inĝ. M. F. Onnen, ĉefdelegito de U.E.A., kiu el propra poŝo donacis ormoneron al ĉiu infano kiu sukcesis en la A-ekzameno.

(Laŭ afablaj informoj de s-ro J. D. Brakel, Rotterdam).

IOE en Nederlando.

Reprezentanto de „Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto" en Nederlando estas: Inĝ. D. Klage, Talingstr. 8, SCHOORL (N.H.).

Esperanto kiel pontolingvo.

Ĉe Eldonejo J. M. Meulenhoff, Amsterdam, aperis en poŝlibra formato: „Meesters der Roemeense vertelkunst" (Majstroj de la rumana rakontarto). La rakontoj estas kolektitaj de Mag. S. Pragano kaj enkondukitaj de G. P. de Ridder.
Kun granda simpatio li informas pri la poresperanta laboro de mag. Pragano, kiu bedaŭrinde ne ĝisvivis la eldonon de la verko. Laŭ peto de li oni akceptis du rakontojn tradukitajn el la rumana pere de Esperanto. Li volis tiel pruvi la valoron de Esperanto kiel pontolingvo.
La rakonto „Een reiziger hoort op de weg te zijn" (Al vojaĝanto decas vojiro) estas tradukita de J. R. Janssen el: „Niĉjo Mensogulo kaj aliaj noveloj" de I. A. Bratescu-Voinesti (trad. el la rumana de T. Morariu. Biblioteko Tutmonda n-ro 10, Berlin, 1927).
Pri la alia rakonto: Een verhaal van lang geleden, de Mihail Sadoveanu, trad. de f-ino C. Baarslag, mankas informoj.

RADIO-SERVO F.E.N.

Bonvolu bone noti, ke RADIO BILBAO plifruigis siajn elsendojn. Ili nun okazas de la 24.05a ĝis la 24.30a merkredvespere (= ĵaŭde de la 0.05 ĝis la 0.30a) je ondolongo 212,4m (1412 kHz).

LONDONO BBC provizore ĉesis la elsendojn en Esperanto. Skribu multnombre por peti rekomencon; eventuale sugestu pri aliaj ondolongoj, kiuj en nia lando estas pli facile kapteblaj.
Adreso sufiĉas: BBC, LONDONO.

UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO EN ROTTERDAM

52-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

En Rotterdam, de la 2a de aŭg. ĝis la 9a de aŭg., la 52a Universala Kongreso de Esperanto okazis en „De Doelen".
Parto de la preparlaboro estis farata en Tel Aviv, Israelo. Pro la milito la kongreso estis translokigata al Rotterdam.
En la inaŭgura ceremonio, la 3an de aŭgusto, salutis la kongreson i.a. la provincestro de Suda Holando, reprezentante la nederlandan registaron, kaj la vicurbestro de Rotterdam. Post la salutoj de la landaj reprezentantoj la festparoladon faris prof. Ivo Lapenna.
Okazis tri ĝeneralaj kunvenoj: unu pri „Esperanto en fakoj kaj profesioj", dua pri „Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la Internacia Lingvo", kaj tria pri „Esperanto por Turismo". Ĉi tiuj kunvenoj prezentis siajn konkludojn al la ferma kunsido de la kongreso.
Tre kortuŝaj kaj altnivelaj estis la prezentoj fare de la Internacia Arta Teatro. Restos en memoro precipe la teatraĵoj „Skatolo kiu muzikas" de la japana aŭtoro Nakamura Ŝinkiĉi kaj „La Holanda Pupo", vodevilo de Julio Baghy.
Okazis plie la prelegoj de la Internacia Somera Universitato (temoj: „Teknika helpo al evolulandoj", „Genocido", „Kontribuo de la judoj al la formiĝo de la Kanaria loĝantaro", „Raciigo de la laboro en agrikulturo kaj hortikulturo", „Katarakto" kaj „Lingvoj piĝinaj kaj kreolaj"), la Belarta kaj Oratora Konkursoj, multaj fakkunsidoj kaj la varia vespero kun skeĉoj, kantoj de Ramona van Dalsem kaj deklamado fare de Nikolaj Rytjkov.
Malgraŭ la mallonga prepartempo la aranĝintoj sukcesis prizorgi ankaŭ tuttagajn ekskursojn kaj postkongresan aranĝon.
En la ferma kunsido la kongreso rezolucie „bedaŭris la sintenon de la sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj rilate la plej grandan proponon iam faritan en la homa historio al internacia instanco" kaj en alia rezolucio deklaris ke „Esperanto estas grava rimedo por progresigi kunlaboron inter nacioj kaj popoloj".
La kongreso restos en memoro pro lo intima sfero kiu regis ankaŭ en la distraj aranĝoj.
Al la 52a Universala Kongreso aliĝis entute proks. 1250 personoj.

R. Groeneveld.

LA 23-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO.

Pro la milito en la Proksima Oriento la estraro de TEJO decidis okazigi la 23an I.J.K. ne en Natanja, Israelo, sed en Rotterdam, koincide kun la Universala Kongreso de Esperanto en la sama Kongresejo, „De Doelen".
La I.J.K. okazis de la 3a ĝis la 9a de aŭgusto 1967. Partoprenis ĝin entute 90 personoj, gejunuloj kaj pli aĝaj observantoj. Ĉiuj gejunuloj loĝis kune en la hotelŝipo „Jan Backx" en la Roterdama Parkhaveno.
La malfermo okazis ĵaŭde posttagmeze en la kongresejo. La festparoladon, post la salutoj de la landaj reprezentantoj, faris la prezidanto de TEJO, Ivo Osibov, pri la temo „Turismo". La programo de la I.J.K. estis parte transprenita de la Eŭropa Junulara Konferenco okazanta en Enkhuizen kiel komuna aranĝo de la germana kaj nederlanda TEJO-sekcioj. Nederlandaj specialistoj prelegis pri diversaj aspektoj de la temo „Nederlandaj kulturo kaj socio".
Vendrede matene okazis la unua prelego de ĉi tiu serio. Prelegis s-ro drs. G. F. Makkink, profesia biologo, pri la marsekigaj laboroj en la Ejsela lago kaj en la Delto. La preleginto prezentis cifere la grandiozecon de la laboroj kaj ilustris sian prelegon per diapozitivoj.
Sabate prelegis Roberto Groeneveld, studento, pri „Nederlanda Politiko". Lia prelego temis pri la Provo-movado kaj pri D'66, du movadoj kiuj vigligis la nederlandan politikon dum la lastaj du jaroj kaj kiuj altiris grandan atenton, ankaŭ en eksterlando. La oratora konkurso, kiu okazis sabate posttagmeze, estis komuna aranĝo de la UK kaj de la I.J.K. Partoprenis ĝin kvar gejunuloj. Du premioj estis aljuĝataj, la unua al Francisko Simonnet, Francujo kaj la dua al Eliza Kehlet el Danujo. Estas urĝa neceso ke la landaj asocioj de UEA kaj la TEJO-sekcioj stimulu la partoprenon en oratoraj konkursoj organizante ilin dum la naciaj kongresoj en la diversaj landoj.
La du lastaj prelegoj en la serio pri Nederlando estis farataj dimanĉe. Matene s-ro A. den Haan el Hago, profesoro de la Nederlanda lingvo parolis pri la Nederlanda literaturo ekde la pasinta jarcento ĝis hodiaŭ. Li parolis i.a. pri Multatuli, pri la renoviga movado ĉirkaŭ 1880 kaj pri la postmilita nederlanda poezio kun Lucebert kaj aliaj. La plej nova generacio de poetoj havas kontakton kun la Provomovado*).
Posttagmeze s-ro Jan Schaap, artinstruisto, ankaŭ el Hago, prezentis la arton en Nederlando post la lasta milito. Esti artisto, li diris, signifas streĉe labori, tage kaj ofte ankaŭ nokte.
Li montris per kunportitaj bildoj, ke la plej novaj tendencoj en la nuntempa arto ne plu estas abstraktaj; novaj skoloj estas i.a. Nov-Figurismo kaj „Pop-arto". Ankaŭ s-ro Schaap parolis pri la Provo-movado. La „okazaĵoj" de la provokuloj estas origine eltrovaĵoj de la Pop-artistoj. La bildo de la estonta socio „Nova Babilono" de la provokuloj estas ankaŭ artverko, ĝia aŭtoro estas la tre multflanka nederlanda artisto Constant Nieuwenhuis.
Cetere en la I.J.K. estis du ĝeneralaj kunvenoj, el kiuj unu pri „ĝenerala turismo"; okazis la Junulara Balo, kiu ĉi-foje estis esceptokaze malfermita por pliaĝuloj, kaj la ferma kunsido kune kun la Universala Kongreso.
El la laborkunsidoj menciindas ke kvar landaj sekcioj, nome NEJ, GEJ, BEJA kaj JEFO, atingis interkonsenton pri komune eldonota gazeto, „KONCIZE".
La kongreso, resume, havis agrablan etoson kaj ebligis fruktodonan laboron.

*) La evoluon de la nederlanda poezio tra la jarcentoj ilustris deklamado de tradukitaj poemoj post la prelego de s-ro Den Haan sub gvido de Wouter Pilger.

R. Groeneveld.

AŬTUNAJ FERIAJ KURSOJ

15. — 21. de okt. en Arhus, Danlando, invitas vin veni por ĉeesti. Belega altlernejo en interesa loko. Prospekton sendas senpage al vi

L. FRIIS,
Ingemannsvej 9.
Abyhöj, Danlando.

N.B. S-ino R. van Dalsem, Bussumsestraat 18, Den Haag, gvidos karavanon el Nederlando.

PROPAGANDO KOSTAS MULTE DA MONO, TIAL SUBTENU LA MABESOONE-FONDAĴON!

Kasistino: F-ino J. E. Prins, Hora Siccamasingel 294, Groningen - Poŝtĝirkonto: 81 58 89.

TRA LA LIBRARO

NORDA PRISMO; kultura, socia, literatura revuo kvaronjara. Redakcio: F. Szilájyi (ĉefredaktoro), B. Ragnarsson, J. H. Rosbach, V. Setälä kaj P. Thorsen. Abonprezo 10 gld. jare. Abonojn akceptas Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.

Literatur- kaj kulturrevuoj ne longe vivas en Esperantujo. Amare ni repensas pri la belegaj eldonoj de „Literatura Mondo", pri „La Nica Literatura Revuo", pri „Monda Kulturo". Evidente multaj esperantistoj ne konscias ke Esperanto bezonas literaturon, sed la literaturo same bezonas la Esperanto-publikon.
Antaŭ mi kuŝas la printempa numero 1967 de Norda Prismo. Fakte kun miro mi konstatas ke ĝi eniris jam sian dektrian jaron, do devas esti iuj kaŭzoj pro tiu jam longa(?) vivo. Trafoliumante la numeron oni estas tuj kaptata de la riĉa kaj varia enhavo. Originalaĵoj alternas kun tradukoj, prozo kun poezio, recenzoj kun sciindaĵoj, spicitaj kun klaraj bildoj. La kajero (formato 14½ x 20½ cm.) ampleksas 64 klarlitere presitajn paĝojn kaj elstaras pro la kutime bonega lingvaĵo. En ĝi trovas lokon ne nur la konataj verkantoj, sed ankaŭ novaj talentoj, tiel ke la revuo reprezentas ĝisdatan staton

de nia literaturo. Tamen ankaŭ sur alia tereno la kajeroj estas informiloj: artikoloj pri pentro- kaj skulpto-artoj, pri vojaĝoj kaj landoj, pri . . . jes, pri ĉio, kio estas sciinda. La redakcio faras laŭdindan laboron por la internacia lingvo. Kaj ni? Ĉu ni subtenas ĝin per tiuj nur 10 guldenoj, por kiuj ni ricevas pli ol 200 valorplenajn paĝojn, kaj en kelkaj jaroj ampleksan malmultekostan kajeraron? Se vi ne jam faris, abonu ĝin tuj. Vi ne nur subtenas la laborojn de la redakcianoj, sed instigas la verkantojn kaj pliriĉigas viajn sciojn per bonega lingvaĵo.

P. M.

JARLIBRO de Universala Esperanto-Asocio 1967, Dua Parto. Eld. U.E.A. Rotterdam. Nur por uzo de membroj, 61. p.

El la raporto de la estraro mi citas i.a. ke kiel nova landa asocio aliĝis Konga Esperanto-Instituto (Kinshasa). Grava nova faka asocio aliĝis al U.E.A., tiu de la Fervojistoj (IFEF). La financa situacio de U.E.A. fariĝis iom pli bona.
Oni devis ĉesigi eldonon de la revuo Monda Kulturo. Cetere el la raporto evidentiĝas vigla agado de la estraro kaj de U.E.A. ĝenerale. Mi atentigas ekz. al paragrafo „Agado de la Prezidanto" (vizitoj de prof. Lapenna al i.a. Orient-Eŭropo kaj Usono).
Neĝusta estas la eldiro sur p. 55 („Literaturo"), ke T. Jung en sia verko „La Esperanta Konjugacio" klopodas pravigi participsistemon kontraŭfundamentan.
Laŭ recenzo de G. J. Degenkamp en „N.E." de jan. 1967 p. 8, Jung demontras, „ke pli ol 99.8% de la Zamenhofaj konjugaciaj formoj estas tempaj aŭ almenaŭ tempe klarigeblaj, do respondas al la tempindikoj de la 6-a regulo de nia gramatiko".
Kontraŭe oni laŭdas en la Jarlibro sur la sama paĝo la verkon de K. Kalocsay: „Vojaĝo inter la tempoj", dirante i.a., ke ĝi „estas en sia speco unika lingvo-scienca verko . . . . ". Rimarkinde estas, ke d-ro V. Sadler en sia recenzo pri la sama verko en „Esperanto" de marto 1967, p. 46 diras, ke la verko de Kalocsay en la strikta senco ne estas scienca. „Nur parte la aŭtoro aplikas la sciencan procedon: kolekti vivajn ekzemplojn kaj el ili ekstrakti la teoriojn". Vere kurioza malakordo.

H. G.

LES LANGUES INTERNATIONALES de Pierre Burney, serio: Que sais je? n-ro 968, eld. Presses Universitaires de Frances, Paris, 1966. 162 p., 11½ x 17½ cm, broŝurita. 2-a eld., prezo?

La unuan eldonon (de 1962) Prof-o Lapenna en „Esperanto" de julio/aŭgusto 1962 atakis akre kaj grandparte prave. En ĉi tiu dua eldono la aŭtoro forigis kelkajn el la plej sendube kontraŭfaktaj asertoj pri Esperanto, ekz. pri la neekzisto de „radaro". Tamen ankaŭ en ĉi tiu dua eldono restas multo kritikinda.
Unue li (mem franco!) dediĉas superproporcian paĝospacon al la lingvo franca (45 paĝojn pri la franca lingvo kontraŭ 8 pri la angla!). Nur lia kritiko je la gramatiko de Esperanto (la akuzativo kaj la fleksio de la adjektivoj) estas konsiderinda serioze. En sia pritrakto de la planlingvoj li estas iom partia favore al la naturalismaj, larĝe citante la kritikon de la naturalistoj je Esperanto, eĉ kelkajn tre futilajn (ekz. pri la homonimeco de „radaro" kaj „rad-a-ro"), kaj prezentante iliajn argumentojn, kontraŭ kiuj la esperantistoj havas seriozajn kontraŭargumentojn, kiel pruvitajn faktojn, sed dirante preskaŭ neniom pri la prezo de la „natureco" de la naturalismaj planlingvoj precipe en ilia derivado. Restas ankaŭ la malĝusta aserto: „Esperanto estas kreita sufiĉe rapide" (p. 88), dum Zamenhof laboradis pri Esperanto 13 jarojn (de 1874 ĝis 1887). Liaj asertoj pri la Esperanta literaturo ne estas bazitaj sur kono de almenaŭ kelkaj majstroverkoj de la Esperanta literaturo.

D-ro W. A. Verloren van Themaat.

NI RICEVIS

LA SKOLTA MONDO, oficiala organo de la Skolta Esperantista Ligo. La enhavo estas ankaŭ interesa por ne-skoltoj. Reprezentanto por Nederlando: J. K. Hammer, Wibautstraat 49, Zaandam.

INFORMA BULTENO DE LA FOIRO EN BRNO, BRNO, junio 1967. Pri la Internacia Foiro en BRNO en aŭtuno 1967. Kun multaj informoj pri i.a. Brno kaj ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ konciza historio de la E-movado en Brno.

LA GERMANA POPOLO KAJ LA UNUIĜINTAJ NACIOJ.
Eldonejo: Deutsche Liga für die Vereinte Nationen, Verlag Zeit im Bild, DRESDEN, 1967. 63 p., 16 x 23 cm., broŝ.
Informas pri la principoj de la ekstera politiko de la G.D.R. Havebla ĉe: Centra Laborrondo de la Esperanto-amikaro de la GDR en la Germana Kulturligo, 108 BERLIN, Charlottenstrasse 60.

Taskoj por la Esperanto-Ekzamenoj 1967.

Ĉi-sube ni presigas la taskojn de tiu ĉi jaro por la E-diplomo. En sekvontaj numeroj ni publikigos tiujn por la M- kaj la S-diplomoj.

ĜENERALA NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMENO-KOMITATO

E1. Amersfoort, 13 majo 1967.
Traduku (14.00—16.00 h.):

La terpomoj.

1. La terpomojn oni transportis antaŭ kelkaj jarcentoj el Ameriko.
2. La fama Francisko Drake sendis iom da ili al sia amiko por planti.
3. Li skribis al li: „La frukto de tiu ĉi kreskaĵo estas tiel bongusta, ke - laŭ mia opinio - estus utile ĝin kulturi en Eŭropo".
4. La amiko de Drake pensis, ke la „fruktoj" estas la verdaj tuberoj, kreskantaj sur la planto.
5. Kiam en la aŭtuno la tuberoj estis flavaj, li invitis multajn altrangulojn por festa manĝo.
6. Antaŭ ol la tagmanĝo finiĝis, la servistoj metis kovritan pladon sur la tablon; la gastiganto ekstaris kaj diris:
7. „Mi havas la honoron regali vin je frukto, kies semon mi ricevis de mia amiko, la mondfama Drake. Li certigis al mi, ke la kulturado de tiu ĉi frukto estos tre profitdona por Anglujo".
8. La invititaj parlamentanoj gustumis la frukton, kiu estis fritita en butero kaj sur kiu oni ŝutis sukeron kaj cinamon*), sed ĝia gusto estis naŭza.
9. Ĉiuj opiniis, ke la frukto estas konvena por Ameriko, sed ne por Anglujo.
10. Post kelkaj tagoj ordonis la amiko de Drake al la ĝardenisto, ke li forigu la kreskaĵojn el la ĝardeno.
11. Sed promenante iun matenon en la ĝardeno, li vidis rondajn nigrajn objektojn en la cindro.
12. Li piedpremis unu objekton. Ĝi estis bakita terpomo, kiu tre agrable odoris.
13. Li demandis la ĝardeniston, kio tio estas; tiu ĉi respondis, ke li bruligis la radikojn de la kreskaĵo el Ameriko.
14. La amiko de Drake komprenis nun ĉion. Li ordonis kolekti la subterajn tuberojn kaj invitis denove la parlamentanojn.

*) kaneel.

E.2.
Traduku en Esperanton (10.00-12.00 h.):

De gierigaard en de aap.

1. Een zeer rijke gierigaard bezat een aap, die zijn schatten moest bewaken.
2. In een van de grote kamers van het huis bevond zich een enorme *brandkast,* gevuld met goud en zilver.
3. De rijkaard kende geen groter genoegen dan zijn rijkdommen te bewonderen.
4. Op zekere dag wilde de man een vriend bezoeken en liet de aap alleen thuis.
5. Het dier *installeerde zich* achter een van de ramen in een grote stoel en keek naar de voorbijgangers.
6. Plotseling zag hij een buurman, die van zijn balkon een geldstukje naar een bedelaar wierp.
7. U weet, dat apen mensen graag nadoen; dat is hun instinct.
8. De aap holde naar de kast, haalde er een handvol gouden en zilveren munten uit en wierp ze op straat.
9. Alle bedelaars in de wijk kwamen aanhollen om van het buitenkansje te profiteren.
10. Op hetzelfde ogenblik kwam de gierigaard thuis van zijn bezoek.
11. Toen hij zag, wat er gebeurde, werd hij rood van toorn; hij nam een stok om de aap te slaan.
12. „Word kalm, beste vriend", zei zijn buurman tot hem, „straf het dier niet.
13. Zonder twijfel is het dom, geld door de ramen te gooien.
14. Maar is het niet een even grote dwaasheid het geld in een koffer op te stapelen zonder profijt voor uzelf en voor anderen?

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA"

Aganta prez.: S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12. Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage. Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.). Tel.: 0 25 60 - 76 15.
Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver. L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

15. Het geld is een goede dienaar, maar een slechte meester".

---

brandkast = monŝranko.
installeerde zich = traduku: ging zitten.

E.3.

Diktaĵo.

Distingo kontraŭvola.

La reĝo Frederiko la Granda iam distingis per ordeno unu el siaj oficiroj dum tempo de paco. La oficiro estis sincerkora soldato, kaj tial li ne tre ĝojis pri la distingaĵo. Kiam la reĝo transdonis al li la ordenon, li ne povis deteni sin, diri iom grumble: „Via reĝa moŝto, al militisto decas akcepti distingaĵon nur sur la batalkampo". Le reĝo ridis al la malkontenta oficiro en la vizaĝon kaj diris: „Kion do? Ne estu azeno kaj portu la aĵon; pro vi mi ne povas komenci militon"!

KONCIZE

Du novaj Esperanto-stratoj.

Dum la 19-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (6-12.5.1967) estas inaŭguritaj du Esperanto-stratoj: unu en la kongresurbo FULDA kaj alia en la ekskursloko HILDERS. La ceremonio trovis vastan eĥon en gazetaro kaj enloĝantaro.

En Britujo: Centro por studoj por Ras-Persekuto.

La ekstermado de hebreoj, slavoj kaj ciganoj fare de la nazioj kaj la grandaj ĉasoj al „sorĉistinoj" dum la 15-a kaj 16-a jarcentoj - jen du el la temoj nun studataj en la nove fondita Centro por Esploroj pri Kolektiva Psikopatologio ĉe la Universitato de Sussex, Britujo. Oni priskribas la laboron tie faratan per la termino „kolektiva psikopatologio", ĉar temas pri persekutaj movadoj, en kiuj homoj, kiuj unuope estas mense normalaj, kolektive kondutas kiel psikomalsanuloj. La direktoro de la Centro estas profesoro Norman Cohn. Li klarigis, ke tiaj psikomalsanaj persekutantoj tipe rigardis siajn viktimojn kiel ne tute homajn. Pro tio ili povis senskrupule persekuti kaj ofte eĉ ekstermi ilin.
La centro en Sussex estas la unua tia en la mondo, sed jam aperis dua centro en Usono, kiu studas ras-malamon. Oni esperas, ke poste estos pluraj interligitaj centroj en diversaj partoj de la mondo. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

INTERNACIAJ AŬTUNAJ FERIAJ KURSOJ en AARHUS - Danlando.

15—21 oktobro 1967.

En la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Aarhus.
Informoj haveblaj ĉe s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhöj, Danlando.
Vidu ankaŭ la anoncon sur p. 76.

KORESPONDPETO

S-ino Jarka Subertova, Srázná 9, JIHLAVA, Ĉeĥoslovakujo, 40-j. oficistino, ŝatas interŝanĝi bildkartojn.

Esperanto en Komerco - kvinlingva raporto pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm. 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.
Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.

KUL